# EKO 2023

Pensu globe
Agu loke
Por la landa,
Fakaj kaj
Regiona
Laboro

Jen la plej gravaj partneroj de la EKO-komunikoj

Universaleco, Instruistoj, Fervojistoj, Medicinistoj,
Komercistoj, Blinduloj, Kolektantoj

**EKO 2023 / 20,  Aprilo 4, 2023**

**Kun partneroj UEA, ILEI, IFEF, UMEA, IKEF, LIBE kaj ELF-AREK**

## AMO 100 temoj detalige

AMO
100
la vojo antaŭen

Ni aliras la temon sub ses gravaj subtemoj; ne tro multaj sed kovrante multon:

- Kulture, literature
- Organize, lande
- Interes-teme, fake
- Renkontiĝe, kongrese
- Komunike, mesaĝe

### Kulture, literature

1. Kiuj estas niaj literaturaj atutoij? Kiel eluzi ilin?
2. Kiel ni evoluigu niajn kulturajn agadojn?
3. Kiel uzi Eo-kontaktojn por sproni  transnaciajn projekjtojn.

### Organize, lande

1. Kiel ni trovu kaj subtenu niaja mortajn landajn asociojn?
2. Kiel UEA kaj ILEI kaj aliaj fortigu funciantajn LA?
3, Kiel mobilizi lokajn grupojn por kontribui al ;la nacia agado?

### Interes-teme, fake

1. Kiel eluzi la meritojn de niaj fakaj asocioj?

2. Kiel revivigi la multajn neaktivajn fakajn asociojn?
3, Kiel fortigi la rilatojn de FA kun samfakaj nemovadaj instancoj?

**Renkontiĝe, kongrese**

1. Kiel fortigi la rolojn de kontintentaj kongresoj?
2. Kiel fortigi landajn kaj lokajn renkontiĝojn?
3. Kiel pli bone konigi lokajn renkontiĝojn, ankaŭ fakajn?
4. Kiel utilu la <Eventa Servo> de UEA?

Komunike, mesaĝe

1. Kiel UEA, ILEI kaj akiaj eluzula retajn eblojn?
2, Kiel tiuj uzu komunikilojn por pli efike konigi sin?
3. Kiel UEA kaj ILEI kaj aliaj fortigu sian internan komunikadon?

# Indiĝenoj en la fokuso

Post longa momento de silento, nia asocio COPROFER rekomencas siajn respondecojn por informi vin pri siaj agadoj En marto 2023 ni iris sur la teron al Kahuzi-Biega Park por viziti tie la indiĝenajn pigmeojn, forgesitan loĝantaron meze de la arbaro..Morgaŭ En Sha Allah la videoraporto pri ĉi tiu vizito estos en nia Jutuba kanalo kaj en nia Fejsbuka paĝo, en Esperanto. ne hezitu sekvi ĝin

# Togolando kaj Svislando

[Seminario de SIS, Svisa ILEI-Sekcio. Prelegos Koffitche Koufionou el Togolando, tradukisto kaj televidila teknikisto, sekretario de Afrika Komisiono de UEA kaj membro de la Akademio togolanda pri la evea lingvo. | Eventa Servo]

per tiu ligo vi povas legi la detalojn de tiu kunveno, kiu okazos ĉe mi en La Chaux-de-Fonds, Chapeau-Rablé 52. Vi estas bonvenaj.

La komenco estos je la 17a horo, do tempo estos por salti el la Urba Biblioteko, kie situas CDELI, al mia domo.

# UEA ĉe UN pri la homaj rajtoj

Alain Favre, Nicole Margot kaj Stefano Keller, reprezentantoj de UEA ĉe UN en Ĝenevo, Tiuj ĉeestis en la 52a sesio de la Homrajta Konsilio la 10an de marto 2023.

La ĉefa temo de la tago estis: La defioj kaj ŝancoj por la plena ekzercado de siaj rajtoj fare de infanoj en la ciferecamedio – kiel laŭleĝaj kaj politikaj kadroj povas esti plifortigitaj por subteni la rajtojn de infanoj en la interreto – kun akompanaj protektaj aranĝoj.La infanoj kaj junuloj devas esti defendataj kontraŭ pornografiaj retaj publikaĵoj kaj misuzoj, facile atingeblaj en la aktuala mondo. Ĉefe post la pandemia periodo de la viruso Kovim-19, kiam la uzo de retaj konektiĝoj - i.a. de gejunuloj - forte kreskis, plej ofte senkontroleblo fare de plenkreskuloj, gepatroj.La intervenantoj (ŝtatreprezentantoj, NRO-delegitoj, infanoj kaj junuloj) alvokis pri pli efika

protekto de la junularo kontraŭ tiaj krimaj misuzoj.La retan ĉeeston de multaj infanoj uzis kaj daŭre uzas por siaj kontraŭleĝaj agoj diversajpornografie aktivaj krimuloj, kontraŭ kiuj oni alvokis pri apliko de severaj kontroloj kajintervenoj, por savi la infanojn de gravaj prisanaj, mensaj konsekvencoj.




Ankaŭ la retkonektojn provizantaj kompanioj, firmaoj devus tre rapide enkonduki striktajn kontrolojn kaj reguligojn de uzebloj de iliaj servoj, cele al maksimuma protekto de lajunularo kontraŭ tiaj krimaj agoj, detruantaj vivojn.

En alvoko de unu el la alparolantoj, ni aŭdis pri la neceso certigi ke la edukado de infanoj okazas en ties gepatra lingvo, i.a. por ke ili bone komprenu la mesaĝon.

Stefano Keller informiĝis  ĉe kunlaborantino de la UN-oficejo por rilatoj kun NRO-reprezentatoj - pri la aktuale denove ebla ĉeesta partopreno en kunsidoj, kaj koncerne regulojn pri alparoloj.

Ekde nun, posedante la ĉi-jaran enirpermesilon de UN en Ĝenevo, eblos al membroj de la UEA-teamo partopreni en la kompleta programo de venontaj eventoj, kaj ĉefe enĝiaj lingvorajte rilataj diskutoj, per alparola interveno (laŭ novaj reguloj).

Alain Favre, Nicole Margot kaj Stefano Keller

## Mirejo mesaĝas salute al la ĉina kongreso

Grava kunveno, feliĉa okazo revidi samideanojn kaj konatiĝi kun novaj membroj, tempo por ideointerŝanĝoj kaj signifoplenaj decidoj.

Grava kunveno de ekzistanta tutlanda strukturo, kiel ekzistas en dekoj da landoj en la mondo : la landaj asocioj de UEA. Ili estas la vertebraro de nia Asocio UEA. Diligentaj kolegoj transprenas oficon kaj vivigas ilin.

Ne ĉiuj esperantistoj pretas labori teame en tiaj strukturoj. Estas arboj, kiuj staras solaj meze de kampo aŭ ebenaĵo. Oni vidas ilin de for kaj ili same efikas kiel la arboj de arbaroj, kiuj kune kreas mondon de vegetalaĵoj. Estas esperantistoj, kiuj tre brile laboras ekster la landaj strukturoj kaj ilia laboro same efikas, valoras, respektindas. Mi volas mencii la gigantan laboron de Dr Katalin Kovats, kiu prizorgas www.edukado.net; tiu paĝaro ne faras ombron al ILEI, tiu paĝaro estas valora aldono, kompletigo, plia eblo helpi la lernantojn kaj la instruistojn. Mi volas mencii la gigantan laboron de HORI Yasuo, kiu lanĉis kaj prizorgas la Esperanto-Sumoon. Ekzistas pluraj tiaj entreprenoj, Esperanto-centroj, kiuj kontribuas al la divastigo de nia lingvo sen ligiĝi al la landaj strukturoj. Ili havas la rajton fari tion kaj ni ĉiuj devas en plena respekto kunlabori kun ili.

Mi deziras, ke la Ĉina Esperanto-Movado floru kaj kresku en harmonia kunlaboro kun la aliaj agemaj esperantistoj en la tuta mondo. Ĝi estu unu el la multaj instrumentoj de granda orkestro, kies muziko estu harmonia.

Mireille Grosjean, Prezidanto de Svisa Esperanto-Societo (SES), Honora Membro de ILEI

# Voĉo el Afriko

Mana Brinson <mana.esperanto.brinson@gmail.com> , el la DR Kongo, skribis::

https://kohrslernejoicxlm.kluboj.org/jen-fotaro-pri-baldaua-esperanto-lernejo-kaj-orfejo-inaugurotaj/

========= vortoj: 920 =========

La Komunikoj iras al la Landaj kaj Fakaj Asocioj, al la Komitato de UEA, pluraj instancoj de ILEI, al la Estraro de TEJO, al unuopuloj, kiuj petis la ricevon kaj la anoj de pluraj pasintaj AMO-seminarioj. Entute ĉ. 2700 ricevantoj – 1500 rekte plus plusendoj en Hungario, Italio kaj aliaj landoj.

Ĉi tiu komuniko estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde.
Por pli da informoj vidu ĉe: <https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>.

Aperintaj komunikoj legeblaj kaj elŝuteblaj ĉe: http://aktivulo.net/eo/content/komunikoj-pri-agado. La prezento estas ĝisdata ĝis majo **2022** (per EKO 2022-25). Vidu ilin laŭjare, kun klaraj enhavaj indikoj por ĉiu jaro depost 2014.

**ALDONU VIN:** Skribu al <stefan.macgill<ĉe>gmail.com>. Neniu alira kondiĉo aldone al valida retadreso. Malferma al Aligitaj Membroj, eksmembroj, neniam-membroj, klingonuloj, volapukistoj, atistoj, itistoj, ujistoj, iemuloj, Duolingintoj ktp.

**SUBTRAHU VIN:** Skribu al la supra adreso. Donu vian nomon, retadreson, landon kaj (se eble) la grupon aŭ kialon por via ĉeesto en la ekspedolistoj.